

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =
frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.

Pago por anoncoj:

15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
8 kopekoj — por daonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

II:a jaro.

Decembro 1897.

N:o 12 (24).

De la Klubo Esperantista en Uppsala.

La Esperantista Klubo en Uppsala sciigas ĉiujn kunlaborantojn de nia gazeto kaj amikojn de "Esperanto", ke la ĉefa redaktoro de "Lingvo Internacia" de nun estas s:ro Paul Nylén (adr. Uppsala, Klubo Esperantista). Al li oni devas sendi manuskriptojn, sciigojn kaj sin turni kun diversaj demandoj.



Al la abonantoj.

La redakcio petas ĉiujn abonantojn, kiuj deziras ricevadi "Lingvon Internacian" ankaŭ en la jaro 1898, sed ial ne povas nun sendi la abonpagon, sciigi ĝin per poŝtkarto pri sia deziro ricevadi la gazeton: tio ĉi forigos la nebezonan malordon ĉe la dissendado de la numeroj februara kaj marta. La januara numero estos dissendita al ĉiuj abonantoj de la jaro 1897.

La kondiĉoj de la abonado restas la samaj: 4,25 fr. = 3,00 kronoj = 3,30 germ. markoj = 1000 rejsoj = 1,50 rubloj por jara ekzemplero, kaj senpaga kvina ekzemplero al ĉiu liverinta 4 abonojn. Malgrandan rabaton ni povas nur fari al kluboj esperantistaj, kiuj abonas nian gazeton *por ĉiuj siaj membroj*: ili pagos por jara ekzemplero de "Lingvo Internacia" da proklamita abonpago, t. e. 2,85 fr. = 2 kronoj = 2,10 germ. markoj = 665 rejsoj = 1 rublo, sed perdas jam, kompreneble, la senpagan kvinan ekzempleron. Ĉe tia abonado de kluboj la ekzempleroj estos kune sendataj rekte al la kluboj mem, ne al la apartaj anoj, por ke la gazeto je sia flanko ankaŭ havu ian, kvankam malgrandan, rekompencan per la plimalgrandigo de poŝtpago.

La redakcio memorigas al la abonantoj, ke "Lingvo Internacia" estas propraĵo de la esperantistoj, ke ĉiu centimo de la abonpago estas kaj estos

uzata por la gazeto kaj ju pli da centimoj ricevos "Lingvo", des pli ĝi povos doni al la abonantoj: se la gazeto donos profiton, ĝi estos uzita por plibonigo de la gazeto mem. Tial ni petas ĉiun, por kiu estas kara la progreso de nia afero, aboni "Lingvon Internacian" en eble pli granda nombro da ekzempleroj kaj propagandi ĝin inter siaj konatoj. Se ni havos multajn abonantojn en la jaro 1898, ni povos jam en tiu ĉi jaro plioftigi la gazeton kaj tiamaniere fari ĝin pli viva kaj movema ligilo de apartaj esperantistoj, disĵetitaj sur la tera globo, — kaj tio ĉi donus al nia afero tre fortan puŝon antaŭen.

La redakcio.

El Rusujo.

La Odesa Filio de l' Societo "Espero".

Niaj legantoj jam scias, ke en tiu ĉi jaro printempe en Odeso estis oficiale permesita fondi la unuan filion de la peterburga Societo "Espero". Mi ne bezonas paroli pri la graveco de tiu ĉi fakto por la progreso de nia lingvo: jam antaŭ kelkaj jaroj en Odeso formiĝis sufiĉe granda privata rondeto de esperantistoj, kiu energie laboris por la bono de "Esperanto". La manko de l' oficiala permeso tre multe ĝenis la laboron de la rondeto kaj en la lastaj jaroj eĉ preskaŭ neniigis ĝin. Tial la permeso, veninta printempe (ĝi estas datita de $18\frac{1}{6}$:a de marto, sed estis ricevita en majo), multe ĝojigis la odesajn esperantanojn. Bedaŭrinde la printempo kaj somero tute ne konvenas en Odeso por ia societa laborado, ĉar tre multaj odesanoj somere tute forveturas el la urbo, aliaj loĝiĝas en la ĉirkaŭaĵoj de l' urbo kaj la triaj restas en la urbo mem. Kun grandegaj penoj oni povas aranĝi simplan privatun kunvenon. Pro tiuj ĉi cirkonstancoj la odesanoj, malgraŭ la deziro tuj komenci la agadon, devis prokrasti la malfermon de l' filio ĝis aŭtuno kaj somere havis nur kelkajn privatajn kunvenojn por prijuĝi la manieron de l' estonta agado. Oni devis trovi monon kaj ian loĝejon por malfermi la societon. Ĉiaj malhelpoj estis forigitaj nur en septembro kaj la $24\frac{1}{12}$:an de oktobro la fondantoj (prof. R. A. Prendel, d-ro A. M. Lucenko, A. M. Arnold, D. D. Sigareviĉ, S. V. Ĵitkov*) kunvokis la unuan komunan kunvenon de la filio. Ĉirkaŭ 20 personoj ekster la fondantoj fariĝis membroj de la filio ĝis tiu tempo.

Dezirante kiel eble konatigi la odesanojn kun la celoj de nia societo kaj lingvo, la fondantoj per gazetaj anoncoj kaj per specialaj avizoj invitis al la unua kunveno multajn gastojn. Bedaŭrinde la tre malbona pluva vetero malhelpis al tre multaj veni, kaj la tuta nombro da apudestintaj en la unua kunveno estis nur ĉirkaŭ 50—60 homoj. La loka "Komerca Klubo" donis al ni senpage siajn belajn salonojn.

En 1 horo post tagmezo s-ro A. M. Arnold anoncis la kunvenon malfermita. Tuj post tiu ĉi anonco estis komencita solena danko preĝo al Dio, post kiu pastro Meleti Ŝaravski sin turnis al la apudestantoj kun kelkaj vortoj pri la lingvo kaj societo. Li metis la demandon: "ĉu oni povas preĝi por lingvo internacia kaj por la societo, vastiganta tiun lingvon", — kaj diris, ke li mem konatiĝis kun la lingvo kaj kun la regularo de la societo,

*) S-ro A. I. Andreev, fondanto de l' odesa filio, somere transloĝiĝis en Kostroma'n.

kaj venis al la konvinko, ke nia lingvo persekutas la sanktan celon de l' proksimiĝo de homoj, ke tiu ĉi celo estas tute kristana kaj ke tial oni povas senĝene preĝi por la societo, persekutanta la celon tiom bonan. Se iun konfuzus la ekzemplo de l' turo Babilona, se li pensus, ke Dio, miksinde la lingvojn, ne volas ke la homoj de diversaj landoj komprenu unu la alian — li memoru, ke la unua dono de l' Spirito Sankta al la apostoloj estis dono de l' lingvoj, t. e. la dono, kies celo estas la celo de lingvo internacia.

Post la preĝo s-ro A. M. Arnold proponis elekti prezidanton de la komitato (kiu, laŭ la regularo, estas ankaŭ prezidanto de la komuna kunveno) kaj membrojn de la komitato, sed la apudestantoj decidis, ke s-ro Arnold restu prezidanto en tiu ĉi kunveno kaj ke la elekto estu en la fino de la kunveno. Tiam s-ro Arnold en detala kaj konvinka parolo (vidu la n-ran sekvantan) konatigis la apudestantojn kun la celoj kaj problemoj de la societo. La parolo elvokis multajn aplaŭdojn. Post s-ro Arnold parolis s-ro O. J. Pergament pri lingvo internacia. Lia parolo ankaŭ estis rekompencita per daŭraj aplaŭdoj. Fine s-ro V. Gernet diris kelkajn vortojn en Esperanto kaj interalie transdonis al la kunveno la saluton de d-ro L. Zamenhof. De s-ro A. M. Arnold estis ankaŭ tralegitaj la gratulaj telegramoj: de s-ro N. Borovko, prezidanto de la societo "Espero", de d-ro J. D. Ostrovski, de s-rino E. Mankovskaja, de s-ro Grünfeld, de s-ro Andrejev kaj letero de s-ro N. Sloušĉ.

Poste estis tralegita la raporto de la fondantoj pri ilia agado por fondi en Odeso la filion de "Espero", kaj fine estis elektita kiel prezidanto de la komitato d-ro V. V. Filipoviĉ*) kaj kiel membroj de la komitato s-roj A. M. Arnold, O. J. Pergament, I. M. Lucenko, V. A. Gernet kaj S. O. Ŝatunovski.

Kelkaj personoj el la invititaj gastoj esprimis la deziron fariĝi membroj de la societo. Interalie ankaŭ la pastro Meleti Ŝaravski.

En mia sekvanta letero mi komunikos pri la unuaj paŝoj de la komitato kaj pri ĝiaj intencoj.

V. Gernet.



Novajoj.

Nova klubo.

La 12-an de Decembro ni ricevis de s-ro doktoro I. Asklöf (Karlskrona, Svedujo) la sekvantan komunikigon:

"Mi povas rakonti ĝojan novaĵon. Ni formis hieraŭ malgrandan rondeton, kiun ni nomis "la Rondeto Esperantista de Karlskrona". La rondeto estis fondita ĉe mi en mia loĝejo; estron oni elektis min, sekretarion d-ro V. Peterson, lektoro ĉe la lernejo, kasiston oni elektis d-ro A. Nilsson, lerneja adjunkto. Ni decidis havi kunsidojn unu fojon ĉiumonate dum la semestroj. Ni ankaŭ decidis malgrandan jarpagon por formi bibliotekon, propagandi k. t. p."

* * *

En Odessa ekzistas granda publika biblioteko. La administracio de tiu ĉi biblioteko petis oficiale s-rin V. Gernet akceli la pleniĝon de l' apartaĵo de Lermontov per esperantaj eldonoj de liaj verkoj kaj entute provizi la bibliotekon per esperantaj eldonoj, ĉar tiujn ĉi eldonojn oni ofte demandas.

**) S-ro Arnold rifuzis esti prezidanto kaj d-ro Filipoviĉ estis elektita unuvoĉe.

Kompreneble la peto de la biblioteko estis plenumita. La biblioteko oficiale dankis s:ron Gernet.

* * *

— D:ro L. M. Zamenhof tute forlasis Grodno'n kaj transloĝiĝis en Varsovion. De nun lia konstanta adreso estas: *Rusujo, Varsovio* (Varŝava), *str. Dzika, N:o 9.*

* * *

Eldonanto de Biblioteko farigis ankoraŭ s:ro A. M. Arnold (10 r. ĉiujare).

* * *

Pri Esperanto parolis: *En Rusujo* — tre multaj gazetoj kaj ĵurnaloj. En majo, junio kaj julio de tiu ĉi jaro la gazetoj en Krim tre multe kaj ofte parolis pri nia lingvo danke al tio, ke unu franca esperantisto skribis al sia korespondanto en Simferopol, s-ro *Brjus*, ke li aŭdis, ke en Krim ekzistas tre multaj esperantistoj. S-ro *Brjus* transdonis tiun ĉi leteron al la gazetoj. En la gazeto "*Krim*" aperis tre ridinda letero de simferopola komercisto s-ro *Korpuš* (la letero estas represita en N:o 78 de la gazeto "*Jalta*"), en kiu li diras, ke "la popolo Esperanto efektive ekzistas, sed kie ĝi loĝas, mi ne scias" ... Li rakontas ankaŭ, ke nian lingvon oni ne povas lerni, ĉar la literoj ne estas niaj, sed estas kvazaŭ "katolikaj", ke en Jalto estis "esperantistaj studentoj", el kiuj unu estis nomata *Landlid* (videble s-ro V. Langlet) kaj la tuta Jalto ilin sciis. Kompreneble niaj amikoj uzis la okazon kaj donis necesajn klarigojn. Tiel, en gazeto "*Krim*" (N:o ?) ni trovas vastan artikolon pri "La lingvo de estonteco", subskribitan *I. L. Silvin*. Ni ne scias nur, kie la aŭtoro ĉerpis la sciigon, ke en 1895 en Odeso estis tutmonda kongreso de esperantistoj, en kiu partoprenis 200 homoj, interalie s-roj *Šlejer* kaj *Zamenhof*. En N:o 57 de la gazeto "*Salgin*", eldonata en Simferopol, estas presita tre bona, vasta kaj konvinka artikolo "Pri la lingvo internacia Esperanto", skribita de nia agema amiko, d-ro I. D. Ostrovski en Jalta, kaj en N:o 77 de l' sama gazeto ni trovas serion da sciigoj pri nia lingvo, pri la nombro da esperantistoj en Krim, pri la agado de s-ro G. Moch, pri "Etranger" k. t. p. En N:o 221 de granda ĉiutaga peterburga gazeto "*Novosti i Birĵevaja Gazeta*" estas presita en Esperanto versaĵo de s-ro *K. Ostanjevič*, sekretario de la societo "Espero". La versaĵo prezentas saluton "al niaj karaj gastoj", prezidanto de l' Franca Respubliko kaj lia anaro. Pri tiu ĉi versaĵo parolis kelkaj rusaj gazetoj, sed ni ne havas sciigojn pri ili.* — En N:o 120 de "*Varŝavski Dnevnik*" estis presita insulta artikolo pri la "Spirita kongreso" de d-ro *Zamenhof*. N:o 134 de l' sama gazeto enhavas respondan "leteron al la redakcio" de nia Varsovia batalanto, s-rino *A. Proĥorovič-Koĉmareno*. — N:o 10 de ĵurnalo "*Nov*" enhavas favoran artikolon: "Lingvo tutmonda Esperanto" kun sciigoj pri nia lingvo. — En N:o 190 de granda ĉiutaga peterburga gazeto "*Narod*" sin trovas tre interesa artikolo de s-ro *N. Sutkovoĵ* pri la kongreso de paco kaj lingvo internacia. La artikolo multe parolas pri la agado de nia senlaca amiko s-ro G. Moch. — Pri nia lingvo parolis ankaŭ la velocipeda gazeto "*Ciklist*" en Moskvo. — La malfermo de la Odesa filio de l' S.-Peterburga Societo "Espero" igis paroli pri nia lingvo ĉiujn gazetojn en Odeso. "*Odesski Listok*", "*Odesskija Novosti*", "*Novorossijski Telegraf*", "*Juĵnoje Obozrenije*", "*Odesskaja Gazeta*" presis serion da notoj pri nia lingvo kaj pri la Odesa Filio. Sufiĉe detalaj raportoj pri la unua sciena komuna kunveno estis presitaj en N:o 243 kaj 244 de "*Odesski Listok*", en N:o 4112 kaj 4113 de "*Odesskija Novosti*", en N:o 272 de "*Juĵnoje Obozrenije*", en N:o 269 de "*Odesskaja Gazeta*". Krom tio en odesaj gazetoj estas konstante presataj anoncoj de l' loka "Espero". — La ĵurnalo "*Marki*", eldonata en Kiev, presas anoncojn pri nia lingvo kaj gazeto.

En Francujo ni devas noti la stenografian ĵurnalon "*Le Grand Sténographe*", kies ĉiu numero enhavas vastan artikolon, dediĉitan al Esperanto. Multaj artikoloj estas subskribitaj *L. de Beaufront*. — En N:o 11 de l' ĵurnalo "*La Paix par Le Droit*" estas lokita tre bona artikolo de nia amiko *René Lemaire*. La artikolo estas titolita: "Lingvo internacia kaj ĝia rolo en la afero de paco". La anoncado pri nia lingvo en pacaj ĵurnaloj havas specialan signifon, ĉar al la lasta kongreso de l' pacanoj oni rekomendis konatiĝi kun nia lingvo. — Pri la agado de la pariza ĵurnalo "*L'Etranger*" ni ŝajne ne bezonas paroli, ĉar tre multaj esperantistoj abonas ĝin.

* Vidu la leteron de s-ro O. senditan kun tiu ĉi numero.

En Danujo ni jam notis tre vastan kaj detalan artikolon "Lingvo Internacia" en N:o 246, 247 kaj 248 de "*Nykjöbing Venstreblad*", apartenantan al la plumo de s-ro Toksvig.



El raporto al la kongreso de l' paco 1897.

Mi ne povas esprimi pli bone kion mi pensas pri l' esperanto, ol reskribante kion mi diris en la kongreso universala de l' Paco, kiu kunvenis en aŭgusto de tiu ĉi jaro en Hamburgo.

Jen, antaŭe, en kiaj cirkonstancoj mi estis igata paroli tie por nia mirinda lingvo!

Tuj en ilia unua kongreso universala (Paris, 1889), la pacanoj proklamis, ke la posedo de ia lingvo internacia estus tre dezirinda por la progreso de l' movado paciga. Komitato estis elektata, kaj komisiata raporti al la kongreso de l' jaro sekvanta. Sed la demando ne estis matura, kaj nenia raporto estis prezentata al la kongreso de 1890.

La demando revenis nur al la sepa kongreso (Budapest, 1896). Propono estis prezentata de sinjorino Griess-Traut (en Paris) por la elekto de la Latino kiel lingvo internacia. Laŭ mia propono, la kongreso, konsiderante ke la demando estis esence teĥnika, kaj preteriris ĝian kapablecon, kontentis sin nomante novan komitaton por ekzameni l' aferon*).

Por tiu ĉi komitato mi skribis raporton, kiun mi legis en la kongreso.

Eble tiu raporto ne respondos al la espero de iaj esperantanoj, ĉar ĝi ne konkludas: "Volu la kongreso akcepti l' esperanton kiel lingvon internacian por niaj interparoladoj kaj rilatoj skribaj." Sed mi petas niajn samideanojn, ke ili memoru la malfacilecon de l' peno, ke ili estu paciencaj, kaj ne volu meti la plugilon antaŭ la bovoj! Mi ne povis konatigi kun la lingvo ĉiujn kongresanojn, nek la plinombro inter ili, ĉar mi ne sciis antaŭe kiu venos Hamburgon; kaj, se mi sciis tion, mi ne povas skribi al tiom da personoj (ĉar por tia propagando ne estas sufiĉe sendi cirkulerojn: bezone estas skribi, aŭ almenaŭ respondi al la multaj leteroj, kiujn oni ricevas). Mi nur povis al-tiri al nia lingvo kelkajn pacanojn, kiujn mi elektis inter la plej eminentaj kaj influantaj, kaj kiuj militos kun mi por la lingvo.

Nu, memkompreneble estas ke, antaŭ aŭdantaro tiel nepreparita, propono kiel la supre supozita aligus eble apenaŭ kvin inter cent da voĉoj: l' Esperanto estus entombata en la rondoj pacanaj.

Mi do kontentiĝis montrante, en mia raporto, kia estas nun la pozicio de l' demando, kiel la lingvoj naturaj (vivantaj aŭ mortintaj) estas malfacilaj, kaj neindaj plenumi la rolon de komprenilo internacia; mi komparis la volapükon, tiun senforman monstron, kun l' esperanto, kaj esprimis mian opinion koncerne tiun ĉi; kaj mi nur konkludas ke tia opinio, al kiu partoprenas kelkaj tre estimataj kongresanoj, estas konsiderinda, almenaŭ kiel tiu de la latinanoj. Fine, mi proponis la sekvantan decidaton:

"*La kongreso.*

"Proklamante ree, kiel utila estus la ekzisto de ia lingvo internacia, sufiĉe facila kaj posedanta sufiĉajn esprimilojn, por ke ĝia uzo fariĝu neevitebla en la rilatoj inter alilandanoj;

* S-inoj Griess-Taut kaj Eugénie Potonié-Pierre; s-roj A. Journet (korespondanto de "Alliance universelle"), W. Rosenberger, direktoro de "Akademio de lingvo tutmonda" (Peterburgo), L. de Beaufront, Fr. Ronai.

“Konsiderante ke diversaj lingvoj, vivantaj, mortintaj aŭ artifikaj, estis proponitaj por tiu celo;

“Konsiderante ke la neĉesanta pligrandiĝo de la rilatoj internaciaj kaŭzos sen ia dubo, ke la personoj, bezonantaj tian komunikilon, akceptos, per si mem, la plej indan inter ili (aŭ ian alian ankoraŭ kreotan);

“Konsiderante, aliflanke, ke s-ro L. Zamenhof ĵus iniciatis “skriban kongreson” pri tiu demando, tiel senpartie, ke ĉia spertulo partoprenos al tiu kongreso;

“Notante la proklamojn, elparolitajn tuŝante la lingvon “Esperanto”, kiun kelke da kongresanoj konsideras kiel respondantan al ĉiuj bezonoj kaj kostantaj sengravan penon;

“Rekomendas al la anoj de la societoj de l’ Paco ekzameni tiun demandon, kaj, aparte, kompari l’ Esperanton kaj la Latinon, kiuj ambaŭ estis precipe signalitaj al ĝia atento;

“Konsilas al ili partopreni, kiel eble, kongreson iniciatitan de s-ro Zamenhof, aŭ almenaŭ observi ĝiajn laborojn;

“Rekomendas al la gazetoj pacaj la eksperimenton, konsistantan en la kreo de rubriko en lingvo internacia;

“Kaj lasas al ia kongreso estonta la zorgon decidi pri l’ uzo de ia lingvo internacia por la raportoj kaj interparoladoj, laŭ la konkludo de tiu necesa antaŭa ekzameno.”

Tion, mi konfidas, la latinanoj povas aprobi kiel la esperantanoj; eĉ ili estos devigataj aprobi ĝin, ĉar tiu propono estas tute senpartia, metante la ambaŭ lingvojn sur la sama rango. Kaj, kiam la pacanoj, kiuj interesas sin al la demando, estos sciigataj pri la ekzisto de l’ esperanto, kaj komparos ĝin kun la latino, ni povas esti trankvilaj: la venko estos nia!

* * *

Mi konsideras kiel devo persona proklami la sekvantan, kiel sciigon por la personoj, kiujn la demando interesas.

Mi kredas, ke mi ne estas tute nesperta pri tiuj aferoj, kiuj estis ĉiam por mi okupo plejamata. Mi jam lernis, iel bone, latinon kaj grekon, forgesis ilin amabŭ, kaj ne volus entrepreni ree ilian lernadon! Aliflanke, mi posedas kelkajn lingvojn vivantajn. Mi ekzamenis ĉiujn sistemojn de lingvo arta, kiuj venis antaŭ miajn okulojn. Mi provis lerni la volapŭkon sufiĉe por konvinkiĝi, ke tio estas nefarebla, eĉ por homo iel lingvosperta. Fine, je l’ sama tempo, t. e. en 1889, mi lernis la esperanton.

Nun, konstanta praktiko konvinkis min, ke tiu lasta plenumis ĉiujn kondiĉojn, postuleblajn de lingvo internacia; la kontentigo, kiun ĝi inspiris al mi, estis neniam interrompata.

Mi jesigas, ke homo kun bona meza instruo bezonas ne pli ol duonon da horo por kompreni ĝian artifikajon, kaj kelkajn tagojn por sukcese skribi kaj paroli ĝin kuranĉe. Mi jesigas, ke la metodo de l’ “disartikigo” de l’ vortoj efektive ebligas interkomunikiĝi senprezare kun alilingvulo, kiu neniam aŭdis ion ajn pri l’ ekzisto de tiu lingvo; mi eksperimentis tion kun multaj personoj, kiuj senescepte komprenis miajn leterojn, kaj inter kiuj kelkaj respondis tuj al mi en esperanto.

Mallonge, mia plena konvinko, fondita sur kelkjara praktiko, estas ke la komunikilo, kies necesecon ni sentas, ekzistas; la problemo estas solvita, pli bone ol oni kuraĝis esperi, kaj tiamaniere, ke ĉia nova provo de lingvo

internacia malsukcesos sen ia dubo, se ĝi ne estos fondata sur la samaj principoj kiel l' esperanto, t. e. se ĝi ne estos, praktike, la sama lingvo.

Mi konsideras do s-ron Zamenhof kiel unu el la plej grandaj bonfarintoj de l' homaro. Kaj mi konfidas ke, en la estonto, ĉiuj pensantuloj opinios same.

Gaston Moch.

Kiel aranĝi propagandon de nia lingvo?

En N-ro 8—9 de nia gazeto s-ro Zakrjĵevski proponas aranĝi agentaron, por propagandi nian lingvon kaj elekti min estron de tiu ĉi agentaro. Mi pensas, ke fari tian agentaron estus tre bone kaj utile por nia afero. Mi ankaŭ tre dankas s-ron Zakrjĵevski por lia propono elekti min estron de agentoj. Per tiu ĉi propono s-ro Zakrjĵevski faras al mi grandan honoron, kiun mi ne povas ne ŝati. Sed, se oni elektus min, mi tute ne povus akcepti tiun ĉi grandegan kaj gravan devon, ĉar mi havas por tio ĉi nek sufiĉan liberan tempon, nek fortojn. Mi pensas eĉ, ke nenia sola homo povas akcepti la administradon de agentaro, ĉar tiu ĉi afero estas tro malsimpla kaj malfacila. Entute, mi pensas, ke nenia grava parto de nia internacia afero povas esti administrata de sola homo, ĉar elektita homo povas montriĝi nekapabla, neakurata, ne sufiĉe konsciencema kaj entute malprospere elektita, kaj per tio ĉi nia afero povas suferi. Ĉiu grava parto de nia internacia afero devas esti administrata de aparta instituto, kunmetita el kelkaj homoj, kaj ju pli multahoma estos tiu ĉi instituto, des pli ĝi estos fidinda.

Tiel mi pensas, ke por administrado de agentaro ni devas elekti ne unupersonan estron, sed apartan propagandan komitaton, el kelkaj personoj en ia granda urbo, kie estas multe da esperantistoj. Tiu ĉi komitato unuigas ĉiujn propagandistojn en unu grandan laborantan taĉmenton. Ĝi kolektas monon oferatan de niaj amikoj por propagando, preparas necesajn por propagando objektojn, kunvenas periode kaj prijuĝas diversajn demandojn pri propagando. Ne ĝenante propagandistojn en iliaj laboroj, la komitato helpas al ili per siaj konsiloj, presante en la gazeto siajn planojn kaj instrukciojn de propagando, donante ĉiajn klarigojn, provizas la propagandistojn per propagandaj objektoj kaj entute zorgas pri tio, ke la laboro de l' propagandistoj estu eble energia, efikema kaj fruktoporta, kaj ke la mono, oferita por propagando estu uzata eble plej utile.

Krom tio, la komitato ricevas de la propagandistoj ĉiujn raportojn pri iliaj propagandaj laboroj, presas pri tio ĉi en la gazeto, por ke ĉiuj niaj amikoj sciu, kiel iras la propagando; ankaŭ la komitato ricevas de agentoj ĉiujn projektojn kaj proponojn, kiuj rilatas propagandon, prijuĝas tiujn ĉi projektojn kaj proponojn kaj presas ilin kun sia konkludo en la gazeto; presas ankaŭ pri ĉiuj novaj kaj bonaj rimedoj de propagando, kiujn uzas la propagandistoj, por ke ĉiu propagandisto povu uzi sperton de siaj kolegoj. Tiu ĉi komitato sendube estus tre utila por nia afero, kaj propagando de nia lingvo kun helpo de l' komitato irus multe pli sukcese. Se ekzistus la komitato, niaj propagandistoj scius pri la laboroj de siaj kolegoj, vidus la sukcesojn de tiuj ĉi laboroj kaj sentus sin ne solajn, sed en tuta armeo da laborantoj, kaj tio ĉi fortikigus ilian energion kaj plimultigus iliajn fortojn. Krom tio, ili povus uzi tiajn rimedojn de propagando, kiuj estas sendube plej efikemaj kaj frukto-

portaj, sed kiuj povas esti uzataj nur kun helpo de komitato. En mia artikolo: "Kiel propagandi nian lingvon" (N:ro 6—7, 1896) mi proponis tutan vicon da rimedoj por komuna organigita propagando. El tiuj ĉi rimedoj la plej oportuna, plej malkara kaj plej efika estas aparta anonco pri lingvo internacia. Jen estas modelo de tia anonco:

LINGVO INTERNACIA
ESPERANTO

tre facila por ellernado (oni povas ellerni ĝin en kelke da tagoj) donas eblon korespondadi kun homoj de ĉiuj nacioj eĉ sen ellernado de la lingvo, havas jam grandan literaturon kaj sian propran malkaran gazeton (1,50 rubl. por jaro), havas grandegan sukceson kaj estas uzata en ĉiuj landoj de l' mondo. Tiu ĉi lingvo celas proksimigi homojn de diversaj nacioj kaj fari inter ili pacon, amon, reciprokan estimon kaj fratecon. Ĝi ne estas arbitre elpensita, sed kunmetita el vortoj de kelkaj ĉefaj naciaj lingvoj kaj prefere el la vortoj, kiuj estas kompreneblaj por ĉiu inteligenta homo sen ia lernado. La gramatiko de tiu ĉi lingvo estas tiel simpla, ke oni povas ellerni ĝin en daŭro de duonhoru. La lingvo Esperanto estas aprobita de grafo L. N. Tolstoj, Max Müller kaj multaj aliaj eminentaj homoj. Por ellerni tiun ĉi lingvon estas bezona nur sola libro: "Plena lernolibro de lingvo internacia kun du vortaroj", kosto 15 kop. Kaj por fina kaj ĉiuflanka ellernado oni bezonas ankaŭ libron "Ekzercaro", kiu kostas 30 kop. Tiujn ĉi librojn oni povas ricevi en libra butikoj de N sur Strato N, aŭ ĉe agento de lingvo internacia, kiu vivas sur Strato N, en domo de N*). Tiu ĉi agento senpage instruas la lingvon internacian kaj donas ĉiujn informojn kaj klarigojn, tuŝantajn ellernadon de ĝi, kaj ankaŭ donas senpage por legado kaj trarigardo diversajn esperantistajn librojn kaj la gazeton. —

La komitato sendas al ĉiu agento po kelke da ekzempleroj de tiu ĉi anonco. La agento surgluas tiun ĉi anoncon en ĉiuj pli vivaj lokoj de lia urbo**). Tiuj ĉi surgluitaj anoncoj senpage sciigus pri nia lingvo milionojn da homoj en diversaj urboj, prefere do en malgrandaj urboj, kie ĉia anonco estas okazo kaj faras famon kaj bruon. Kun la anoncoj la komitato sendas prunte al la agento malgrandan provizon da verkoj N:roj 72 kaj 77. Tiujn ĉi librojn la agento parte vendas mem, parte donas por vendado al ia loka librovendisto kun ia rabato (ekzemple 20—30 %). Kiam ĉiuj libroj estos venditaj, la agento sendas enspezitan monon al la komitato kaj ricevas de ĝi novan provizon da libroj kaj tiel plu. Tiel ni povus aranĝi preskaŭ sen ĉia elspezo grandegan, senhaltan anoncadon pri nia lingvo kaj konstantan vendadon de niaj libroj en multaj urboj. Tiel ni povus atingi tion, ke nia lingvo estus sciata preskaŭ en ĉiuj urboj kaj urbetoj de l' civilizita mondo, kaj ĉiu deziranto havus eblon aĉeti esperantistajn librojn en sia urbo sen ĉiaj klopodoj kaj ankaŭ havi senpagan afablan gvidanton en ellernado. Tiu ĉi rimedo de propagando, laŭ mia opinio, estas pli efikema kaj fruktoporta, ol ĉiuj aliaj kune, kaj kostus tiom malmulte, ke preskaŭ nenion kostus.

*) Adresojn skribas agento mem.

**) Agento povas ankaŭ dungi homon, kiu starante sur plej granda strato de la urbo, disdonas la anoncon al la pasantoj. Por tia disdono povas esti presita tiu sama anonco, sed en malgranda formo. Tiu ĉi homo povas ankaŭ vendi internaciajn librojn.

Krom la vendado de libroj la agento zorgas, ke ĉiu publika legejo aŭ biblioteko en lia urbo ĉiam havu sur tablo nian gazeton kaj lernolibron. Por tio ĉi agento devas havi rajton aboni senpage nian gazeton por ĉiuj lokaj legejoj. Tiu ĉi rimedo estas ankaŭ tre grava kaj utila, ĉar en legejoj kolektiĝas prefere plej inteligentaj, pensantaj homoj de urbo, kaj sekve plej kapablaj interesiĝi pri nia afero.

Mi ankaŭ proponas doni rajton al ĉiu abonanto de la gazeto aboni ĝin por malgrandigita abonpago (ekzemple por $\frac{1}{2}$ aŭ $\frac{1}{3}$ da abonpago) por siaj konatoj, kiuj jam sufiĉe ellernis esperanton, sed ne abonas la gazeton. Mi mem havas multajn tiajn konatojn, kiuj jam iom ellernis nian lingvon, sed ne abonas la gazeton, malgraŭ miaj invitoj. Se tiu ĉi rajto estus donita al abonantoj, do ĉiu, eĉ plej malriĉa abonanto povus aboni kelke da ekzempleroj de nia gazeto por siaj konatoj. Mi pensas, ke grandega plimulto da tiaj nevolaj abonantoj post unu jaro fariĝus efektivaj kaj memstaraj abonantoj. La gazeto kaj nia afero interesigus ilin, kaj ili jam ne povus lasi ĝin. Tiu ĉi rimedo de propagando ne alportus al la redakcio signifan malprofiton, ĉar tiu ĉi rimedo donus al la redakcio eblon presi la gazeton en multe pli granda nombro da ekzempleroj. Kaj tiu ĉi rimedo estus tre utila por nia afero, ĉar ĝi ekstreme multobligus la abonantojn de la gazeto, abonantoj do estas veraj esperantistoj, pri kiuj ni povas jam esperi, ke ili neniam lasos nin. Sendube, ekzistas ankoraŭ multaj bonaj kaj utilaj rimedoj de propagando, kiujn uzas niaj amikoj, kaj kiujn ni ankoraŭ ne scias, kaj mi proponas al niaj amikoj publikigi en la gazeto pri ĉiuj tiaj rimedoj.

Karaj amikoj! Ni diligente kaj senlace propagandu nian lingvon. Ni ne trompu sin: kvankam nia afero konstante progresas, sed progresas tre malmulte kaj malrapide. Esperantistoj estas ankoraŭ tre malmultaj, kaj tiu ĉi malmulteco kunligas niajn manojn kaj piedojn. Nia gazeto estas ridinde malgranda kaj nia literaturo estas tro malriĉa. Kaj nia gazeto, kaj niaj libroj, laŭ sia amplekso, estas ekstreme multekostaj, ĉar estas eldonataj en tro malgranda nombro da ekzempleroj. Kaj tio ĉi dependas nur de tio, ke nia adeptaro estas tre malmulta. Niaj materialaj rimedoj estas malgrandegaj. Ni ne povas signife pligrandigi sian gazeton, nek literaturon. Nia gazeto kaj nia literaturo povas esti pligrandigita kaj malkarigita nur ĉe pligrandigo de la nombro da esperantistoj. Sen signifa multobligo de esperantistoj signifa sukceso por ni estas neebla. Propagando, jen estas plej grava, plej bezona nia afero, jen de kio ĉefe dependas estonta sorto de nia lingvo. Ni lasu ĉion, kaj komencu propagandi. Se ni deziras sukceson al nia lingvo, ni devas ĝin propagandi, propagandi kaj propagandi.

M. S. Rakitski.

De la redakcio. — Ni tute konsentas la opinion de s-ro Rakitski kaj volonte malpligrandigus la koston de la gazeto, kiel li diras, se ni estus konvinkitaj, ke tio ĉi ne pereigos la gazeton mem, kiu ja apenaŭ kovras la elspezojn de eldonado. La venanta jaro montros, ĉu ni povos fari ian rabaton laŭ la propono de s-ro Rakitski.



La Baleno.

Sveda humoresko de **Falstaff.**

Tradukis *P. Nylén.*

(Ĝisfina daŭrigo.)

5.

Estis sunbrilanta julia mateno. La urbestro malfermis sian fenestron al la flanko de l' placo, kaj diris: "Fi je l' diablo!" La direktoro de l' banko faris la samon kaj diris la samon. La pastro, kiu iris ĵus al la preĝejo por fari la meson de mateno, *pensis* precize la samon, eĉ du fojojn, ĉar li ne havis fenestron por fermi post si.

Ĉiu homo en la urbo, kiam li pasis la placon, diris la samon aŭ ion ankoraŭ pli malbonan. La malgranda hipokrita hundeto nigra de l' paroĥestra vidvino Tornikandro malbenis, ankaŭ ĝi, tiel bone kiel do senprudenta besto kapablas, al granda teruro de sia piega mastrino, kiu tamen sentadis la plej grandan tenton fari la samon, kiam ŝi alestis sur la placo por aĉeti rozojn por la tombo de sia kanario...

Kio estis do okazinta? Kial do la urbo malbenis?

El la feste flagornamita ligna konstruaĵo de Sen & Petrofilo, meze sur la placo, eliris la plej abomenaj odoroj, pri kiuj homo iam povus imagi. Dum la lastaj tagoj, nome, estis ekstrema granda varmo, kaj la baleno, tiel duonpatrine flegita de la urbo, komencis por venĝo putriĝi, putriĝi tiel fulmrapide, ke neniu povis proksimiĝi al la ligna konstruaĵo ĝis la interspaco de dekkvin paŝoj. Sur la malplena spaco tiel fariĝinta staris Sen kaj Petrofilo kaj la vendisto de ligno, kun hermetike fermitaj nazoj, turnadante la manilon de la gurdo kaj svingante malgrandajn flagojn, sur kiuj oni povis legi:

Hodiaŭ plialtigita pago!

La vaporoj de la tiel senzorge malŝatita baleno pligrandiĝis en forteco kun ĉiu kvarono da horo laŭ tiom, kiom la suno altleviĝis sur la ĉielo. En la horo 10 restis sur la vendeja placo nur unu komercisto de acidharingo baltika*). En la horo 10,15 forkuris ankaŭ li, donante kriojn de plendego. Nun oni ne povis proksimiĝi al la baleno ĝis kvindek paŝoj.

En duonhoro antaŭ la deknua la urbestro dissolvis la kunvenon de la magistrato kaj forkuregis nudkapa. Lin sekvis la tuta publiko, la policanoj kaj ĉiuj la denunciataj krimuloj, kiuj danke al tio ĉi evitis siajn justajn punojn. En unu kvaronhoro antaŭ la deknua la kasisto de la banko ŝtopis ĉiujn banknotojn en sian poŝon kaj forkuris el la lokaĵo. (Poste li forgesis reveni, kaj danke al tio la banko devis siatempe fari brilantan bankeroton). Sed la baleno kuŝis trankvila en sia konstruaĵo kaj tute kviete malbonodorigis plu. La vendisto de ligno manovradis la gurdon kun feliĉega mieno de komprenanta ekonomia raviteco. Sen kaj Petrofilo interŝanĝis fortan manpremon kaj ridis malaltanime: tio ĉi estis ja la projekto de Sen, kiun li, antaŭvidante, subdiris en la orelon de Petrofilo!!! *nun* ilia feliĉo estis farita!

*) Propramaniere preparita haringo baltika, kies akra odoro tute ne konvenas en salono.

Rimarko de l' tradukinto.

6.

La suno de la sekvanta tago melanholie rigardis malsupren sur unu plene senhoman kaj lasitan urbon. Dum la sufokanta somera nokto la internaj ecoj de la baleno tiel timinde disvolviĝis, ke ĉiuj homoj, eĉ la loĝantaj en la ekstremaj randoj, estis devigitaj forkuri. Antaŭ tio la vendisto de parfumoj en la urbo finvendis tutan sian provizon de "eau-de-Cologne" kaj retiris sin, kiel riĉega homo, el la publika vivo.

Meze sur la placo oni vidis nur tri homojn: Sen, Petrofilo kaj la vendisto, manĝante Lukullan matenmanĝon, kiu ili ŝtelis por si sen malfacilaĵo el la hotelo delasita.

La urbanoj estis kuniĝintaj ekster la pordego de la urbo, interkonsiligante, kiel ili povu realmiliti sian urbon.

Ilia murmuro kaj ĉagrenego ne havis iajn limojn. La plej granda kaj komuna malfavoro turnis sin kontraŭ la malfeliĉa urbestro, kiu donis la permeson montradi la balenon. La direktoro de l' banko proponis, ke oni pendigu la urbestron, kaj nur la brulantaj propetegoj de la pastro povis savi la vivon al la tremeganta oficisto.

Post longedaŭra konsiliĝo oni decidis elsendi la brul-estingistaron por disŝprucegi la konstruaĵon kaj la tri malbonegulojn. Sed ĉar la pumpiloj estis en la urbo, tiu ĉi decido ne povis estis plenumita. Krom tio la brulestingistaro unube neigis iri je tri paŝoj pli proksimen al la terura urbo.

Tiam oni ekkonstruis aerostaton kaj metis en ĝin la pafistaron memvolan de la urbo. La pafistoj memvolaj pafis bruletantajn kuglojn suben al la ligna konstruaĵo, sed tiu ĉi ne prenis fajron, kaj la tri malaltanimaj posedantoj estis elfosintaj por si kavojn en la tero, kie ili kuŝadis, malice ridante, dum la baleno plifortigis sian parfumon po kvindek por cent, tiel ke la aerostato estis devigita remalleviĝi sin al la loĝantaro de la urbo.

Tiu ĉi sin trovis nun en laŭforma ribelado. Jam dum tri tagoj ili estis senhejmaj; ĉiuj iliaj negocoj restis haltigitaj, ĉiuj negocaj kambioj estis protestataj, la lernejoj infanoj diskuradis kiel malsataj bestoj sovaĝaj, al la virinoj mankis preĝejo kaj teatro, al la metiistoj mankis laboro, kaj ĉio iradis renkonte al sia perejo.

Oni estis preta fari kion ajn por ekhavi finon de tiu ĉi malespera stato. Oni volis trakti kun la tri viroj en la urbo, oni volis doni al ili oron kaj verdajn arbarojn — eĉ nur se oni *povus* paroli kun ili, eĉ nur se oni povus ekhavi *eblecon* kun ili trakti!

Sed kiamaniere tio ĉi povos fariĝi? Tio estis la sola demando de l' estanta tago.

En tiu terura situacio ekaperis la kriisto de vendado publika de la urbo kiel savanta heroo-angelo. Tiu ĉi honestulo antaŭ multaj jaroj, partoprenanta en ia milito, estis trafita en la nazo per kuglo de paflego. La puŝo estis tamen danke al la longa interspaco tiel malforta, ke la nazo de la kriisto de vendado publika ne suferis alian difekton, ol tion ke la muskoloj de flaro estis forpafigitaj.

Li ne pensis je tio antaŭ ol nun, sed nun li rememoris pri tio, kaj proponis — ĉar li ja en ĉiaj okazoj ne povis senti odoron — ke li iros kiel la sendito de la urbo al la tri balenistoj.

Eksterordinara kriego de ĝojo ekleviĝis de la dankema loĝantaro! Kaj ĉar en la sama momento nordokcidenta ventego ekblovis, kiu pelis la urban

atmosferon en la direkton, kie la loĝantaro trovis sian rifuĝon, oni tuj decidis sendi al la tri viroj la bonegan kriiston kun plena kompetentigo proponi ĝis unu miliono por la forigo de la terura besto, por ke la homoj povu denove loĝi en sia propra urbo.

7.

La surprizo de la tri balenistoj estis ne malgranda, kiam ili ekvidis la respektindan kriiston de vendado publika kontraŭpaŝadi al ili, spitante ĉiujn malhelpaĵojn. Ili akceptis lin singarde, havante la pistolon en la mano kaj demandan rideton sur la lipoj.

Apenaŭ ili ekaŭdis tamen, kion koncernas la demando, tiam ili formetis la pistolojn kaj invitis la senditon al unu glaso da tre bona vino — — — la plej bona, kiun ili povis trovi en la plej interna kelo de la urbestro. Ili trinkis unu kun la alia, ĉiuj kvar, kaj post tio ili ekfajrigis unu cigaron de paco, prenitan rekte el la kesteto Havana de l'bankdirektoro. Dum la vendisto de ligno iris alpreni kelke da frandaj nutraĵoj el la provizejo de l'pastro, Sen kaj Petrofilo komencis trakti kun la kriisto de vendado publika pri la mono elaĉeta.

La disputego, kiu nun fariĝis, spitas al ĉia priskribo. La kriisto de vendado publika, kiu ĉeestis jam antaŭe en milito, persistis tamen, kaj prosperis igi la balenistojn por akcepti la proponon je unu miliono.

Ili malsekigis la ekkonsenton per ankoraŭ iom da l'plejbona vino de la urbestro. Post tio nur restis forigi la balenon.

Ankaŭ ĉe tiu ĉi afero la singardema duonmilionulo Sen montris do sian antaŭvidemecon.

Li estis nome alrabinta al si el la laboratorio de la apotekisto la grandan maŝinon elektrekan. Per la helpo de tiu ĉi li donis — post kiam la ligna konstruaĵo estis forigita — al la baleno tiel fortajn elektrajn puŝojn, ke ĝi movis sin iom post iom antaŭen en la direkto dezirata. *Per ses tielaj puŝoj la baleno estis elmetita ekster la urbon.*

Ekaperis nun la demando pri la pago de la elaĉeta mono. La kriisto de vendado publika volis, kompreneble, marĉandi, sed per malsevera perforto la tri balenistoj elprenis la oran milionon el la maldekstra poŝo de lia pantalono kaj post tio ĉi li estis per unu duobla puŝo elektra forpafita hejmen al la loĝantaro atendanta!

Tiu ĉi returnis tuj en la urbon. Ili trovis ĉion en tia sama stato kiel antaŭe. Nur du objektoj mankis: *la baleno kaj la kasisto de banko* — la unua al neniu, la lasta al ĉiuj.

Por regajni al si fortojn post la suferoj trapasitaj, la magistrato de la urbo decidis entrepreni profundajn ŝanĝojn en ĝia administrado. Sekve oni pendigis la urbestron kaj metis la kriiston de vendado publika en lia loko.

8.

Restas nun sole rakonti, kiel la du kuraĝajn trovistojn de baleno, Sen'on kaj Petrofilon, ektrafis siatempe la multpeza mano de la sorto ĝuste tiam, kiam ili intencis retiri sin kaj ĝuadi en paco kaj ripozo sian pekan monon. Ilia fino estis tiel same terura kiel, ilia vivado. Sed la justeco havas ĉiam sian specialan iron!

La ambaŭ duonmilionuloj ĵus venis hejmen en sian mizeran dometon, kiam la diablo de avareco kaptis ilin ambaŭ. Ili posedis po unu duonan milionon — sed la unu volis forpreni de la alia lian duonan milionon!

Ambaŭ legis la saman penson unu en la okuloj de la alia. Sen surmetis siajn blujn okulvitrojn, sed Petrofilo trarigardis lin malgraŭ tio. Ili vidis ambaŭ, ke la unu intencis de la alia forpreni lian duonmilionon por mem fariĝi plenmilionulo!!!

Dum la noktoj ili penadis mortigi unu la alian, sed tio ĉi malprosperis ĉiam danke al la singardemeco de la alia.

Fine, en ia ventega nokto de aŭtuno, ili ambaŭ ekkuregis eksteren kun eltiritaj tranĉiloj! Ili persekutis unu la alian ĝis sur la bordon — la steloj paliĝis pro teruro... Ilia manbatalado fariĝis ĉiam pli furioza...

Tiam — ho mirindaĵo! — ekaperis sur la bordon la edzino delonge insidanta de la malviva baleno, kaptis la du krimulojn per unu sola ekkapto, kaj ree foriĝis en la oceanon... La ambaŭ amikoj multege teruriĝis, trovante sin en la ventro de la baleno. Ili decidis kunpaciĝi kaj tute forgesi ĉion pasintan. Sed ho ve! Tiu ĉi decido venis tro malfrue! Ĝi helpis tre malmulte.

Ĉar la baleno veturadis ĉiam pli malproksimen en la maron, kaj la du amikoj havis nenian bileton de returno!! Kaj kvankam ili havis po unu duonmiliono en sia poŝo, ili ne povis aĉeti ian bileton de returno!

Kie la ambaŭ amikoj sin trovas nun, neniu scias, eĉ ne

Falstaff,
fakiro.



Pri la aligo de l' pacanoj al la esperanta movado.

Eble multe da esperantanoj jam scias ke, antaŭ kelkaj semajnoj, efektiviĝis en Hamburgo, la VIII:a kongreso de la societoj pacanaj. En tiu kongreso, nia tre laborema amiko, s-ro Gaston Moch, kun multe da aliaj pacanoj, prezentis la lingvon Esperanto, kiel la plej bonan ilon de komunikado. Aliaj personoj, s-roj Raqueni, Macé, Girard, Griess-Traut prezentis la lingvon latinan. La kongreso, traleginte ambaŭ raportojn, decidis turni la atenton de l' pacanoj pri la problemo de lingvo internacia kaj speciale pri la komparo inter la lingvo latina kaj Esperanto. Tiel, ĉiuj la pacanoj de l' mondo (kaj ili estas tre multaj) konas nun la ekzistadon de Esperanto kaj devas elekti inter tiu lingvo kaj la latina lingvo. Mi estas konvinkita, ke ĉiu alia lingva sistemo natura aŭ arta, vivanta aŭ mortinta, ne povas fariĝi lingvo internacia. Ŝajnas al mi ke tiu granda aro de pacanoj estas loko tute pretigita por la propagandado de l' Esperanto; ŝajnas al mi ke la okazo estas tute preta por disvastigadi nian lingvon ĉe tiuj personoj. Do, la amikoj de Esperanto laboradu kaj klopodu rapide kaj lerte!

De longe, la klubo esperantista en Louhans, kiun mi prezidas, donis la ekzemplon de tiu propagando jam; ĝi komprenis ke grandega kaj favora loko de laboro estas preta inter la pacanoj. Antaŭ kelkaj monatoj, ĝi aliĝis al la Oficejoj de l' Paco — de Parizo kaj de Berno. Ĝi sendis reprezentanton en la kongreson de Hamburgo. Mi do havas la rajton rekomendi al la esperantanaj societoj, sekvi ĝian ekzemplon. La aligo de tiuj societoj al la lokaj pacanaj societoj estas laŭ mi tre grava por la sukceso de nia entrepreno. Tiu aligo varbas al ni la simpatiojn de l' pacanoj. Ĝi turnas al ni ilian atenton. Poste, niaj societoj devas sendi al siaj pacanaj kolegoj broŝurojn,

lernolibrojn, vortarojn por iliaj bibliotekoj; ili devas presigi artikolojn en la pacaj gazetoj de sia lando.

Jam, multe da pacanoj antaŭiĝis. Mi ricevis jam demandojn pri sciigoj, de kelkaj francaj kongresanoj. Mi ricevis ankoraŭ saman demandon de l' prezidanto de la Wisbeek Local Peace Association kiu enhavas 6,000 anojn. Mi min proponas klopodi precipe por tiu lasta societo, ĉar nia lingvo estas preskaŭ tute nekonata en Anglujo.

La raporto de s-rino Griess-Traut pri la latina lingvo povas eble nin ĝeni en nia laboro. Tiu raporto estis legita de ĉiuj membroj de l' kongreso kaj ĝi enhavas multe da tre malveraj opinioj. Kelkajn el ili s-ro Moch jam neigis en sia raporto pri Esperanto, sed tio ne estas sufiĉa. Estus bone turni la atenton de l' pacanoj al la aliaj ideoj malsaĝaj de tiu broŝuro. La granda eraro de s-rino Griess-Traut estas ke ŝi ne konas pri kio ŝi parolas. Ŝi neniam lernis zorge kaj longe la problemon pri lingvo internacia. Tial, ŝi forigas, antaŭ ia batalo, lingvon artan kaj proklamas ke ĉia arta lingvo estas nesufiĉa por esti lingvo internacia. Plue, ŝi volas ke oni instruu la lingvon latinan al la lernantoj de l' infanaj lernejoj! Ŝi volas ke oni anstataŭigu la teoriantan instruadon de l' lingvoj per la praktika instruado. Fine, ŝi postulas tutan ŝanĝon en la metodoj de instruado de l' vivantaj kaj mortintaj lingvoj, tutan ŝanĝon en la programoj de l' Universitatoj de ĉiuj landoj. Nur post tiu granda reformo (kiu tre kredeble estos ankoraŭ longatempe atendata) oni povos havi lingvon internacian! kaj kian lingvon! — la latinan!

Estas facile vidigi tiujn erarojn al la pacanoj kiuj eble povus kredi naive la malverojn de s-rino Griess-Traut. Estas facile do varbadi anojn inter pacanoj; sed mi ripetas, la momento favora estas veninta; ni ne ĝin forlasu! S-ro Moch diris, vere aŭ ne, ke Esperantano egalas Pacano. Montru al la multaj amikoj de l' paco ke pacano egalas esperantano!

Gabriel Chavet.



Havu kapitalon!

Se la celo viva estas la feliĉo,
Kun la sort' por ĉiam finu vi batalon -
Ĝin atingi estas sola nur kondiĉo:
Esti bone riĉa, havi kapitalon.
Malriĉul' malforta, pala kaj malsana
De la batalado kontraŭ la mizero
Malbenadas sorton kun la pec' da pano,
Kiun li aĉetis per labor-sufero.
Havas li nenion ekster pacienco,
Ekster la mizero ĉiam lin vipanta,
Kaj almozuleco — lia rekompenco
En la maljuneco, fortojn ne havanta.
Kian do feliĉon li atingos — kian,
Se kun li neniŭ volas eĉ paroli?
Se nur ĉiu mokas laboradon lian
Kaj per "malsaĝulo" povas nur titoli?
L' amo de l' virino estas aĉetata;
La karesoj siaj turnas sin al oro:

Havu kapitalon: — estas vi amata.
Ĉe l' virinoj flugas koron vi el koro;
Sen la mon' beleco indas kion? — nulon;
Kaj per sola mono ĝin aĉetas oni.
Mon' al societo donas la saĝulon,
Kaj multegan povas al ni mono doni
Nek la saĝ' plej alta, nek l' animo bela
Estas egalindaj antaŭ mon' potenco,
Kaj kun sola mono vivo — ne sencela,
Ekzistado homa estas plene senca.
Se vi arton amas, se vi arton celos,
Sed rimedoj estas... nur deziro flama.
Estu konvinkita — ĉiu vin forpelos
Kun rideto pika, kun suspekt' ĉiama.
Sen la mon' scienco estas sonĝo ĉarma.
Estas iluzio por la malriĉulo,
Vivo — mallumeco — vojo tute larma,
La feliĉo via — tombo, almozulo.

Dmitri Jegorov.



De niaj abonantoj.

S-ro *A. M. Grünfeld* skribas al ni:

“En la lasta tempo la nombro da novaj esperantistoj ĉiam pligrandiĝas. La sola kaj la plej bona reunuigilo de esperantistoj estas nia gazeto. Sed tie ĉi aperas unu maloportunaĵo: — la N-roj de la gazeto por la pasintaj jaroj, aparte por la unuaj jaroj de l' ekzistado, jam tute ne ekzistas. En la paĝoj de nia gazeto kaj en privataj leteroj de multaj esperantistoj oni ofte esprimas la deziron akiri tiujn ĉi numerojn. Tial mi volas proponi al la atento de niaj amikoj la reeldonon de la unuaj jarkolektoj de “*Esperantisto*“. Ĉe la konvena nombro da partoprenantaj (ne malpli ol 100) la kosto de l' ekzemplero por la tuta jaro povas esti tre malgranda, ĉirkaŭ 2 fr. 50. Kiuj konsentas mian proponon kaj deziras aboni tiujn ĉi malnovajn jarkolektojn, volu sin turni al la redakcio de “*Lingvo Internacia*“, kaj kiam la nombro da abonintaj fariĝos sufiĉe granda, la redakcio sciigos abonantojn kaj ne rifuzos gvidi la reeldonon. Por fari la komencon mi aldonas 2 rublojn.“

A. Grünfeld.

Ni konsentas la proponon de s-ro Grünfeld kaj petas nur ĉiujn, kiuj sendos al ni monon por tiu ĉi celo, montri la uzon de la mono, se la propono de s-ro Grünfeld ne efektiviĝos.

La redakcio.



Informejo de esperantistoj.

Ŝanĝitaj adresoj de niaj abonantoj:

220. Naumov, Aleksej Jakovleviĉ. Sudovoj ceĥ. *Sormovski Zavod* (gub. de Nijni-Novgorod).

Agentoj de la lingvo Esperanto:

22. S-ro Pavel Avreljanoviĉ Jarnovskij, dua sekretario de la Peterburga societo *Espero*; strato Sergievskaja N:o 17, loĝejo 21. *S.-Peterburgo*. Rusujo. — Promesas ĉiam respondi al ĉiuj esperantistaj leteroj kaj helpos ĉiun esperantiston, kiu lin vizitas.

23. S-ro Ernst Halling, en Telegrafejo, *Kalmar*. Svedujo. (Ne loĝas plu en sia malnova adreso, kiu estis Handtverkargatan 24 C, Stockholm.)

24. S-ro G. Sahlin. *Kalmar*. Svedujo.

25. S-ro V. M. Fedorovski. Mjasnickaja, d. Staĥejeva, *Moskva*. Rusujo.

26. S-ro Johano Dembski (helpanto de l' Smolenska agento); str. Kostielnaja, *Smolensk*. Rusujo.

ANONCOJ.

Depot' da semoj de M. I. Fedorovski

(Rusujo, Moskva, strato Mjasnickaja, dom Staĥejeva)

vendas ekonomiajn, legomajn, florajn kaj aliajn semojn de la plej bona eco. La plena katalogo estas elsendata por 30 kopek. en poŝtsignoj; al eksterrusaj aĉetantoj senpage. La eksterrusaj mendoj estas akceptataj en la lingvo Esperanto.

A. Idelson en Nikolajev (Rusujo) deziras akiri N:oj 2, 3 de “*Esperantistito*“ 1892, N:o 8 de 1894 kaj N:o 4 de 1895.

Enhavo de N:oj I, II kaj III.

	Paĝo.
<i>La nova jaro, de la red.</i>	1
<i>La pasinta jaro</i>	2
<i>Novajoj</i>	3
<i>Malgrandrusa kanto, de V. Derjatnin.</i>	5
<i>Kion volas Henrik Ibsen, de V. L-t (trad.)</i>	6
<i>Al morto, de D. Jegorov</i>	8
<i>La betulo, de Nikolo Setov (trad.)</i>	8
<i>Letero de vojaĝanto, de Jozef Wasniewski</i>	9
<i>Propagando en vojo, de M. S. Rakitski</i>	10
<i>Episkopo, de V. Derjatnin</i>	11
<i>El Heime, de A. Kofman</i>	13
<i>Demandoj kaj respondoj.</i>	13
<i>Informejo de Esperantistoj</i>	14
<i>Adresaro de niaj abonantoj (kompletigo por 1896)</i>	15
<i>Anoncoj</i>	15
<i>Al la esperantistoj, de Jozef Wasniewski</i>	17
<i>Kiel traduki?, de N. Erstifejev</i>	18
<i>Novajoj (pri la lit. konkurso de 1896)</i>	20
<i>El Francujo, de René Lemaire</i>	21
<i>Klopodu—batalu, de P. N—n (trad.)</i>	22
<i>Tagmanĝo de amikoj, de L. E. Meier (trad.)</i>	23
<i>Bibliografio — Kain —, de V. Š.</i>	27
<i>La felico, de K. H.</i>	28
<i>La fidela amiko, de O. Zeidlitz (trad.)</i>	30
<i>Al "letero de tradukinto de Demono", de E. Mankorskaja</i>	31
<i>Letero al la redakcio, de A. Z.</i>	31
<i>Anoncoj</i>	32
<i>Jozef Wasniewski †, de V. Gernet, L. Zamenhof, A. Prohoroviĉ-Koĉmarenko,</i> <i>La Red.</i>	34
<i>Novajoj</i>	36
<i>Ion aŭ nenion?, de N. Borovko</i>	37
<i>Al memoro de Jozef Wasniewski, de Valdemar Langlet</i>	40
<i>El "Versajoj en prozo" de I. S. Turgenev, de V. Š.</i>	41
<i>Demandoj kaj respondoj.</i>	42
<i>Informejo de esperantistoj</i>	43
<i>Adresaro de niaj abonantoj</i>	44
<i>Anoncoj</i>	48

Enhavo de tiu ĉi numero.

<i>Al la abonantoj, de La redakcio</i>	177
<i>El Rusujo, de V. Gernet</i>	178
<i>Novajoj</i>	179
<i>El raporto al la kongreso de V paco 1897, de G. Moch</i>	181
<i>Kiel aranĝi propagandon de nia lingvo? de M. S. Rakitski.</i>	183
<i>La Baleno, de P. N—n (trad.)</i>	185
<i>Pri la aliĝo de V pacanoj al la esperanta mondo, de G. Chavet</i>	188
<i>Havu kapitalon! de D. Jegorov</i>	190
<i>De niaj abonantoj (A. Grünfeld).</i>	190
<i>Informejo de esperantistoj</i>	190

Pri la enhavo de la aliaj numeroj vidu en la fino de la numeroj mem.